

Дмитрий Николаевич Садовников,  
Volga, Volga (Stenjka Rasin)

*tradukita de Kristian Langgaard*

De malantaŭ la insulo  
sur la ondoj de l' river'  
iras ŝipoj multkoloraj,  
flirtas flagoj en aer'.

Sur l' antaŭa Stenjka Razin;  
festas la edziĝon li  
al princino el Persujo  
en varmega amebri'.

Sed la viroj murmuregas:  
"Tute li forgesis nin.  
Nin virino anstataŭos.  
Li fariĝis mem virin"

Tiun mokon aŭdas Stenjka,  
la terura ataman'.  
Ĉirkaŭbrakas la persinon  
li per sia forta man'.

Li la nigrajn brovojn sulkas  
Fulmotondro estas li.  
En okuloj liaj estas  
nun videbla sangebri'.

...

Дмитрий Николаевич Садовников,  
Stenka Rasin

*tradukita de N. N. 21*

In den Wellen hinter Inseln  
Ziehen Kähne malerisch, -  
|: Fangen leis an aufzuwachen,  
Bang ist jedes Angesicht. :|

Stenka Rasin vorn als erster,  
Selig in der Trunkenheit,  
|: Hält im Arme die Prinzessin,  
Die er eben erst befreit. :|

.....  
.....  
.....  
.....

.....  
.....  
.....  
.....

.....  
.....  
.....  
.....

...

“Nu fordonu, mi trezoron  
la plej belan de l' amant'!”  
sonas lia tondrovoĉo  
trans la ondojn al la strand'.

La princino mortpaliĝas  
(Timo estas en l' okul')  
kaj silente aŭdas jenajn  
vortojn de la terurulo:

“Volga, Volga, patrineto!  
Volga, via estu ŝi!  
Ne antaŭe Don-kozakoj  
donis tian-ĉi al vi!

Inter liberuloj estu  
- Volga, Volga, patrinet'  
nek malpaco nek batalo!  
Tial - jen la virinet'!”

Kaj li ĵetas la persinon  
(la plej karan sur la ter')  
en la bluan profundaĵon,  
kaj ŝin glutas la river'.

“Nun agordu balalajkojn!  
Ludi, danci volas ni!  
Estu gaja, kamaradoj  
je la belmemor' pri ŝi!”

...

.....  
.....  
.....  
.....

Plötzlich tönt ein dumpf Gemurre:  
Er verrät uns um ein Weib,  
|: All der Seinen Glück vergißt er  
Um geringen Zeitvertreib. :|

Wolga, Wolga, Mutter Wolga,  
Ruhig fließest du dahin,  
|: Ahnst nicht, was ein Donkosake  
Fürchterliches hat im Sinn. :|

.....  
.....  
.....  
.....

Vorn als erster Stenka Rasin  
Hebt das Weib in wilder Wut, -  
|: Wolga, Wolga, nimm ein Opfer!  
Und er wirft sie in die Flut. :|

Und er sieht sie untergehen,  
Hört noch ihren Jammerschrei:  
|: Stirb als Opfer meiner Treue!  
Stenka Rasin, er ist frei. :|

...

Jen dum kanto, danco, ludo  
 sur la ondoj de l' river'  
 iras ŝipoj multkoloraj,  
 flirtas flagoj en aer'.

*Traduko de la Rusa poeto "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, \*1847 – †1883) en Esperanton de KRISTIAN LANGGAARD (\*1894 – †1957).*

*Arg-478-1036 (2010-03-08 21:19:37)*

*Mi, Manfred Retzlaff, prenis tiun ĉi esperantigon el la reta kolekto "http://www.esperantonia.dk". kiun kunmetis s-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK4640 Fakse, Danio, lars.kromann@mail.dk). Vidu la retejon http://www.esperantonia.dk/volga.htm. Kristian Langgaard estis dana Esperantista verkisto kaj Esperanto-instruisto. Vidu ekzemple: http://www.esperantonia.dk/lingvaj.htm. Pri lia vivo kaj verko vidu ankaŭ la artikolon http://www.esperantonia.dk/bio-langgaard.htm.*

Und die Kähne ziehen weiter,  
 Und die Kähne ziehen fort,  
 |: Und die Wolga fließet weiter  
 Über diesen Schreckensort.

*Traduko de la Rusa poeto "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, \*1847 – †1883) en la Germanan de N. N. 21.*

*Arg-478-1038 (2010-03-09 15:31:43)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi germanigon de la kanto en http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/stenkara.html. Latinskriba aliskribo kaj laŭvorta germanigo troveblas en http://www.kaikracht.de/balalaika/songs/izza\_bal.htm. Vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Stenka\_Rasin.*